

Jarfina cirkulero 2022  
de la prezidanto de AIS  
2022-12-24

Karaj AIS-anoj kaj sciencemuloj,

Mian lastan novjaran mesaĝon vi ricevis antaŭ du jaroj. De tiam nokazis multe, kaj en la mondo – pandemio, milito, futbalo © – kaj en Esperantujo – denove ĉeesta UK en Montrealo kaj 3-a Virtuala Kongreso kun riĉa scienca programo, kiu daŭre estas spektebla (ĝis 2023-12-31). Nia Akademio Internacia de la Sciencoj okazigis plurajn sesiojn: en 2021 SUS-37 kadre de la Germana-Pola-Fervoista kongreso kaj en 2022 SUS-38 kadre de Baltiaj E-Tagoj en Klapjeda, la 75-a sesio de IKU-AIS dum la UK en Montrealo; kaj la respektivaj IKU-SUS libroj de 2021 kaj 2022, kiuj estas senpage elsuteblaj. Dum SUS 38 kaj IKU 75 okazis hibride mia AIS-kurso „Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb“, fine de kiu ekzameniĝis ĉ. 60 personoj, kiuj ricevis AIS-atestojn, kaj estis lotumitaj du ekzempleroj de la nova 4-a eldono de *Kosmo kaj Ni*. Laste kaj espereble ne balaste, AIS provas nun restarigi sian datumbazon de retadreso, kiu perdiĝis kun la fermo de la Yahoo-retlistoj antaŭ du jaroj. Se vi deziras plu ricevi niajn (maloftajn) cirkulerojn, bv. respondi la inviton de AIS-anoj baldaŭ sendotan al multaj antaŭaj AIS-anoj per io-grupoj aŭ sendi mesaĝon al renato ĉe esperanto.org.

Venontsemajne komenciĝos en Germanio du paralelaj sesioj de la 14-a Internacia Vintra Universitato (IVU), okazontaj dum la Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden (8 IVU-prelegoj) kaj LUMINESK en Heilbronn (5 IVU-prelegoj). En iliaj programretpaĝoj aperas la jena prezentaĵo:

*Kiel plurfoje en la pasinteco, ankaŭ ĉi-jare okazos kadre de la NoRo (respektive Luminesk) la Internacia Vintra Universitato (IVU), jam 14-a sesio. IVU estas iniciato de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), simila al la Internacia Kongresa Universitato dum la UK, kiu okazas en la jarŝanĝaj kunvenoj en Germanio ekde 2007, komence dum la Internacia Festivalo kaj sekve dum la NoRo kaj Luminesk. La IVU-prelegoj povas trakti plej diversajn temojn kaj estas popularnivelaĵoj. La konstanta rektoro de IVU estas prof. Amri Wandel, prezidanto de AIS. Vi rekonas la IVU-prelegojn per la indiko IVU.*

Dum LUMINESK okazos la 2-an de januaro la jarkunveno de AIS. Pli poste troviĝas la limdato por IKU-AIS-proponoj por Torino (2023-01-31), SUS 39 dum la 100-a Germana Kongreso fine de majo (proponoj bonvenaj ĉe mi) kaj la 76-a sesio de IKU-AIS en Torino.

Fine, persona tamen scienca noto: antaŭ du tagoj publikiĝis mia artikolo pri nova solvo de la Fermi-Paradokso, kiu jam estis diskonigita en multaj sciencopopularaj novaĵretejoj kaj pluraj lingvoj, i.a. de la renoma revuo TIME.

Mi elkore deziras feliĉajn jarfinajn festojn kaj sanan, pacan kaj sukcesan novan jaron,  
Amri

Akademio Internacia de la Sciencoj | Prezidanto  
Prof. Amri Wandel  
Racah Institute of Physics  
The Hebrew University of Jerusalem, Israel |  
T +972.54.4548712 | W +972.2.6585783 |  
Email amri@huji.ac.il | Zoom huji/7508982919